
# Arbetar-Esperantisten

La Laborista Esperantisto

Nr 2 | December 2014

N-ro 2 | Decembro 2014

Tvåspråkig / Dulingva | 20 :-



## Innehåll | Enhavo

- Esperantoskolan
- Paŝo al la mondo
- Sindikataj novaĵoj
- Revolucia simpleco
- Kurdio: la siriaj kurdoj proklamas egalecon inter viroj kaj virinoj
- Språk är som höns/Lingvoj same kiel kokinoj

**Arbetar-Esperantisten**
är en tvåspråkig tidning på svenska och esperanto som ges ut av Svenska arbetaresperantoförbundet.

**La Laborista Esperantisto**
estas dulingva (sveda-Esperanto) membrogazeto de SLEA (Sveda Laborista Esperanto-Asocio).

**Redaktionen / La redakcio:**
Daniel Sandgren
Marcus Hansson

**Retejo:**
www.slea.se

SLEA på Facebook:
https://www.facebook.com/pages/Svenska-Arbetar-Esperantof%C3%B6rbundet-SLEA/112146885532581

**Retpoŝto:**
arbetaresperantisten@hotmail.com

**La estraro de SLEA:**

**Prezidanto:** Daniel Sandgren
**Sekretario:** Guy Coste
**Kasisto:** Marcus Hansson
**Ceteraj estraranoj:** Soile Lingman
Inga Johansson

**SAT-perantino / SAT-kontakt:**
Inga Johansson
**Retpoŝto:** ishim@hotmail.com

**Atentu!**
Pri la enhavo de
La Laborista Esperantisto responsas la kontribuintoj mem.

**Uppmärksamma!**
Skribenterna ansvarar själva för sina texter. Det är alltså inte nödvändigtvis SLEAs åsikter som presenteras.

# Enhavo

sida / paĝo


- **Ledare / Redaktangulo** 3
- **Esperantoskolan** 4
- **Språk är som höns** 6
- **Lingvoj same kiel kokinoj** 6
- **Revolucia simpleco** 7
- **Sindikataj novaĵoj** 8
- **Kallelse till årsmötet 2015** 10
- **Facit till Esperantoskolans minilektion** 11
- **Paŝo al la mondo** 12
- **Kurdio: la siriaj kurdoj proklamas egalecon inter viroj kaj virinoj** 13
- **Esperanto-TV** 14
- **Libroservo de SLEA** 15


**Redaktionen tackar** alla som på något sätt bidragit till detta nummer. Vi vill även tacka alla som under året skänkt pengar till förbundet!

**Org.nummer:** 802401-1317

**Plusgiro 5 31 60 - 8.** (Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

**LASTA DATO POR LA MANUSKRIPTOJ AL LA SEKVONTA ELDONO ESTAS 2015-01-31.**

**SISTA DATUM ATT SKICKA IN TEXTER TILL KOMMANDE NUMMER ÄR 2015-01-31.**

**Aper-plano 2015**
marto, junio, septembro, decembro

**Adreso de SLEA:**
Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio



# Ledare

Välkommen till årets sista nummer. Vi kan se tillbaka på det gångna året som ett år fyllt av mer aktivitet än på länge. SLEA har jobbat med att göra om och förnya medlemstidningen, vår hemsida och dessutom tagit oss an projektet att översätta och ge ut Yarden av Kristian Lundberg på esperanto. Boken *La korto* kommer ges ut i början av 2015 och presenteras på vårt kommande årsmöte som hålls i Göteborg, den 28 mars 2015. Vi har dessutom haft en del utåtriktad verksamhet med bland annat filmvisning och bokbord. Aktiviteter vi kommer fortsätta med under 2015. Vårt beslut att åter göra vår tidning tvåspråkig och därmed mer tillgänglig och utåtriktad har tagits emot positivt. Vi kommer att fortsätta med att försöka förbättra tidningen och hoppas givetvis att ni medlemmar och läsare vill bidra med detta. Skicka gärna in bidrag i form av texter, kommentarer och önskemål. Nytt i detta nummer är också att vi inför Esperantoskolan. I detta nummer börjar vi med en minilektion. Tanken är att det under denna rubrik förutom korta lektioner och övningar även ska finnas utrymme till att diskutera diverse språkfrågor som rör esperanto och språkets utveckling.

Vi samlar nu kraft inför 2015 och hoppas på ett uppsving och nyvaknande för arbetarrörelsen och det internationella språket esperanto.

Vi i redaktionen önskar er ett gott nytt år!

**Redaktionen**

# Redaktangulo

Bonvenon al la lasta numero ĉi tiu jaro. Ni rigardis malantaŭen je la pasinta jaro kun multe da aktiveco. SLEA laboris pri renovigi la membrogazeton, la hejmpaĝon kaj laboris por traduki kaj eldoni la libron *La korto* (Yarden) de Kristian Lundberg. Ĉi tiun libron ni eldonos dum la komenco de la venonta jaro kaj prezentos ĝin dum la jarkunveno de SLEA, 28a de marto 2015. Ni ankaŭ dum la pasinta jaro havis aktivecojn por nemembroj, inkludante montris filmon kaj aranĝis librotablon. Aktivecoj, kiujn ni daŭrigos dum 2015. Nia decido fari la membrogazeton dulingva kaj per tio fari ĝin pli disponebla por nemembroj ricevis nur pozitivajn resonojn. La renoviga laboro nur ĵus komencis. Ni esperas ke vi membroj kaj legantoj volas kontribui. Bonvolu sendi kontribuojn kiel tekstoj, komentarioj kaj deziroj. Nova en ĉi tiu numero estas ankaŭ ke ni enkondukas la Esperantolernejon. En ĉi tiu numero ni komencas kun eta leciono. La penso estas ke dum ĉi tiu rubriko estos krom lecionoj kaj ekzercoj ekzistos spacon por diskuti diversajn lingvodemandojn kaj aliajn aferojn pri la evoluo de la lingvo.

Ni nun kolektas energion por 2015 kaj esperas je vekiĝo de la laborista movado kaj por la internacia lingvo Esperanto.

Ni deziras vin bonan novjaron!

**La redakcio**

## SLEA JARKOTIZO / MEDLEMSAVGIFT 2015

- Unuopa membro/Enskild medlem 100:-
- Familia membro/Familjemedlem 30:-

- Ungdomar upp till 20 år, arbetslösa, studerande och pensionärer 80:-

- Stödmedlemskap för organisationer 200:-

**Membriĝu / Bli medlem!**

**Plusgiro 5 31 60 - 8.**
(Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

# Minilektion i esperanto

I svenskan skapar man flera ord genom att lägga till stavelser: trevlig – otrevlig; vänlig – ovänlig; glad – gladare; men det är ett oregelbundet system. Man säger ju inte varm – ovarm; stor – storare.
Esperantos ordbildning är regelbunden. Det finns 40 tilläggsstavelser, som var och en har en viss betydelse.




### Vilka ord saknas i följande lista?

| | |
|---|---|
| vid-i | vid-ebla |
| *se* | *synlig* |
| kompreni | komprenebla |
| *förstå* | *begriplig* |
| legi | legebla |
| *läsa* | |
| manĝi | manĝebla |
| *äta* | |

---

| | |
|---|---|
| labor-i | labor-ejo |
| *arbeta* | *arbetsplats* |
| kafo | kafejo |
| *kaffe* | *kafé* |
| lerni | lernejo |
| *lära* | |
| ĉevalo | ĉevalejo |
| *häst* | |

---

| | |
|---|---|
| arb-o | arb-aro |
| *träd* | *skog* |
| insulo | insularo |
| *ö* | *skärgård* |
| monto | montaro |
| *berg* | |
| tendo | tendaro |
| *tält* | |



| | |
|---|---|
| fos-i | fos-ilo |
| *gräva* | *spade* |
| tranĉi | tranĉilo |
| *skära* | *kniv* |
| pesi | pesilo |
| *väga* | |
| fajfi | fajfilo |
| *vissla* | |

---

### Vilken tilläggsstavelse anger:

Grupp, samling, kollektiv: ______________________________

Hjälpmedel, redskap: ______________________________

Plats: ______________________________

Möjlighet: ______________________________

| | |
|---|---|
| *bi* | *bisvärm* |
| abelo | |
| *bok* | *bokhandel* |
| libro | |
| *böja* | *böjlig* |
| fleksi | |
| *höra* | *hörbar* |
| aŭdi | |
| *sy* | *synål* |
| kudri | |
| *kort* | *kortlek* |
| karto | |
| *leka* | *leksak* |
| ludi | |
| *trycka* | *tryckeri* |
| presi | |
| *skriva* | *penna* |
| skribi | |

## Lära sig esperanto

Det finns fler olika läroböcker i esperanto. SLEA tillhandahåller en del. Kontakta oss eller besök vår hemsida för att beställa. På en del orter finns det även esperantoklubbar som håller kurser för nybörjare. På internet finns det idag flera olika sidor som utan kostnad erbjuder olika läramedel och kurser i esperanto. Den största och kanske bästa sidan idag är www.lernu.net. Lernu är en flerspråkig sajt om språket och erbjuder kurser på olika nivåer. Här finns möjligheten att lära sig språket, enkelt och gratis. Här kan du även komma i kontakt med andra esperantister då sidan har tusentals användare världen över.

## Rätt svar?

**Facit finner du på sida 11**

# Språk är som höns

**Språk är som höns** - de har sin hackordning.
I en hönsgård finns en höna som hackar på alla andra, en som hackar på alla utom den första, och så vidare till en som alla hackar på.
Likadant med språken. Av maktskäl finns det ofta ett språk som alla förväntas kunna (fast de flesta inte gör det), ett språk som inte är riktigt lika fint och så vidare.
Ordningen skiftar med tiden, om inte i kraft av regerande imperier så kanske på grund av prestigen hos tidigare. De gamla romarna snobbade gärna med sin grekiska, och de engelska imperiebyggare med sin franska; men när romarriket fallit blev latinet de lärdas världsspråk, och när Britannia inte längre styrde vågorna, då blev deras språk allenarådande.
Tros det.
Men om engelskan är världsspråk i hela Norden, så är svenskan åtminstone finare än finskan, som i sin tur är finare än samiskan. (Och inte kan man vara riktigt lugn på toppen heller. I USA finns det de som fruktar att landet skall bli spanskspråkigt...) Men om man nu inte vill ha hierarkier?
Nå, perfekta lösningar finns kanske inte - varje språk är lättare för vissa än för andra. Men esperanto är åtminstone inte knutet till något enskilt imperium (inte ens till EU, fast det finns vilsegångna esperantister som vill ha det så), och om det är svårare för en japan än för en svensk, och svårare för en svensk än för en italienare, så är det även för japanen lättare än engelskan.
Esperanto är det möjligas utopi.
Och för maktens herrar har esperanto aldrig varit lockande. Vilket faktiskt är ett gott skäl för oss andra att undersöka språket.
Det som är frånstötande för de styrande kan ju vara värdefullt för de styrda.

**Gunnar Gällmo**

# Lingvoj same kiel kokinoj

**Lingvoj, same kiel kokinoj,** havas sian bekordon.
En kokinaro troveblas unu kokino kiu bekas ĉiujn aliajn, unu kiu bekas ĉiujn krom la unuan, kaj tiel plu ĝis unu kiun ĉiuj bekas.
Same pri la lingvoj. Pro kialoj de potenco, ofte troveblas unu lingvo kiun ĉiuj sciu (kvankam la plej multaj tion ne faras), unu iom malpli prestiĝa kaj tiel plu.
La ordo varias tra la tempo, se ne pro la potenco de regantaj imperioj eble pro la prestiĝo de antaŭaj. La malnovaj romianoj preferis fanfaroni pri siaj konoj de la greka, kaj la anglaj imperikonstruantoj de la franca; sed post la falo de la romia imperio, la latino iĝis mondolingvo de kleruloj, kaj kiam Britio ne plu regis la ondojn, tiam ilia lingvo iĝis sole reganta.
Laŭdire.
Sed se la angla estas mondolingvo en tuta Nordio, la sveda estas almenaŭ pli prestiĝa ol la finna, kiu siavice estas pli prestiĝa ol la samea. (Kaj eĉ plej supre, oni ne povas esti tute trankvila. En Usono, kelkaj timas ke la lando iĝos hispanlingva...)
Sed se oni hazarde ne volas havi hierarkiojn?
Nu, perfektaj solvoj eble ne ekzistas - ĉiu lingvo estas pli facila por iuj ol por aliaj. Sed esperanto almenaŭ ne estas ligita al iu aparta imperio (eĉ ne al EU, kvankam kelkaj erarvagantaj esperantistoj ŝatus ke ĝi estu), kaj se ĝi estas pli malfacila por japano ol por svedo, kaj pli malfacila por svedo ol por italo, aliflanke ĝi estas ankaŭ por japano pli facila ol la angla.
Esperanto estas la utopio de la eblo.
Kaj por la sinjoroj de la potenco, esperanto neniam estis alloga. Kio fakte estas bona kialo por ni aliaj esplori la lingvon.
Kio estas malloga por regantoj ja povas esti valora por regatoj.

**Gunnar Gällmo**



# Revolucia simpleco

Zumru Nuru, 67-jaraĝa etiopo, sukcese kreis komunumon laŭ reguloj pri dispartigo kaj respekto. En 1972, li iniciatis vivprojekton en vilaĝo Aŭra Amba (Awra Amba). Nuntempe, 500 homoj harmonie spertis tian vivon: pli eduktiaj, pli nutrataj kun pli agrablaj vivkondiĉoj ol antaŭe kaj ĉirkaŭe. Li estas konsiderata kiel unu el la maloftaj ekzemploj de utopia socialismo.
Origine, analfabeta, li vivis en kamparo kaj ne akceptis ke virinoj estu traktataj kiel proprietaĵoj de viroj kiam tiaj viroj laŭde respektis siajn patrinojn.

Ĉar li evoluis en regiono kie islamanoj, ortodoksanoj kaj ateistoj vivis unu apud la aliaj, kelkfoje konflikte, li opiniis: ”Neniu scias ĉu ekzistas paradizo post morto, do nia rolo estas krei tian paradizon ĉi tie surtere, pace vivante”.

Post unu malsukceso, pro siaj malkutimaj ideoj, li kun kompanoj danke al agado de ĵurnaloj kaj asocioj, setlis komunumon en vilaĝo, kie ili akiris 20 hektaran bienon. Ili bredas zebuojn, ŝafojn, kokinojn, kultivas maizon, tefon (Eragrostis tefloka, loka cerealo), sekajn fazeolojn kaj akiras pli bonajn rezultojn ol en la ĉirkaŭaĵo. Pro manko de tero, ili diversigis siajn laborojn per teksado. Sed ĉi tie, kaj virinoj kaj viroj teksas kiam aliloke tiu metio restas malpermesita al virinoj; viroj kunportas akvon el putoj kaj vartas infanojn male al lokaj kutimoj.

Iam post iam, en aliaj vilaĝoj, loĝantoj konstatas ke tiaj vivkondiĉoj pli bonas ol tiuj, kiujn ili frontas. Tial Zumra Nuru fieras: ”Antaŭe, oni taksis min kiel frenezulo, nuntempe, mi konstatas ke ŝanĝiĝis la rigardoj”.

Junuloj el tiu komunumo sukcese studas: kiam en ĉirkaŭaĵo, infanoj laboras en la kampoj, en Aŭra Amba, kaj knabinoj kaj knaboj havas 3 devojn: iri al lernejo, iomete helpi komunumon por akiri respondecon, kaj....ludi.

El la komunumo, oni nombras 48 universitate diplomitajn studantojn; kelkaj el ili decidas rezigni pri ŝtata kaj altsalajra kariero por transdoni en la komunumo siajn konojn kaj ĝin disvolvi.

Nuntempe, Zumra Nuru konkretigas duan parton de sia revo, konigi sian vivmanieron en la mondo: ”Mi havas nek aŭtoritaton, nek povon, nur revon; tamen niaj ideoj dis volviĝas. Dum kelkaj semajnoj, nia komunumo ricevas centon da vizitantoj, kiuj venas el la tuta mondo, ĉefe el Etiopio kaj Eŭropo”. Invitita de franca asocio Attac, en Liono, li konkludis sian prelegon: ”Kiam havas revon, ĉiu strebu por ĝin realigi”

**Guy Martin**

El Sennaciulo n-ro 5-6 2014.

# Sindikataj novaĵoj

## Kolombio: liberigu Ballesteros!



Huber Ballesteros figuras inter la plej konataj sindikataj kaj hom-rajtaj aktivuloj en Kolombio. Li ankaŭ estas unu el la plej minac-itaj. Li estis arestita la 25an de aŭgusto kaj akuzita pri « ribelo » kaj « financado de terorismo ». Li ne ankoraŭ estis juĝita. Huber estas la vic-prezidanto de FENSUAGRO, dua sindikato en Kolombio kaj unu el la plej persekutitaj, kun pli ol 1.000 membroj murditaj en la pasintaj jaroj. Li ankaŭ estas membro de la Ekzekutiva komitato de la kolombia TUC (CUT). Huber estas aliparte ĉefa gvidanto de la « Patriota marŝado » kiu kampanjas por paco kaj socia justeco en Kolombio. Laŭ ni, Huber estas persekutita pro ties aktiveco, kaj ni kampanjas favore al lia senkondiĉa liberigo, kaj tiu de ĉiuj aliaj politikaj malliberuloj en Kolombio.

**El la retejo:**
http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2608

## Wizz Air: Haltigu kontraŭsindikatismon tuj!

La malmultkosta aerkompanio Wizz Air ĉiam batalis kontraŭ sindikata aktiveco. Komence de tiu jaro, kuraĝa paro de membroj el la kajuta personaro decidis krei sindikaton ĉe Wizz Air. Unu monaton post la fondo de la sindikato, ties prezidento Mircea Constantin estis maldung-ita laŭ falsaj disciplinaj motivoj.

La laborkontrakto de la vic-prezidento kaj la sekretario de la sindikato, Claudiu Bita kaj Denisa Chelu, estis interrompita pretekstante ke ilia sindikata partopreno reprezentas danĝeron por sekureco.

La estraro multobligis la premojn kun konsento de la Direktoro deklarante ke ĝi neniam ak-ceptos ĉeeston de sindikatoj en sia entrepreno. Multaj dungitoj maltrankviliĝas pri siaj labor-postenoj. La tuta afero finiĝis la 4an de novembro per interrompo de laborkontrakto de 19 membroj de la sindikatoj.

**El la retejo: http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2591**

CONFEDERATION SYNDICAT EUROPÉEN TRADE UNION

**Eŭropa Konfederacio de la Sindikatoj kaj Federacio de la Laboristoj en Transportoj**



## Turkio: Deva maldungas siajn laboristojn kiuj aniĝas al sindikatoj

industriALL global union

Partnerece kun IndustriALL, kiu reprezentas 50 milionojn da laboristoj en la sektoroj de mino, energio kaj industrio en 140 landoj: nova forto de la tutmonda solidareco batalanta por pli bonaj kondiĉoj de laboro kaj kreskado de sindikataj rajtoj en la tuta mondo.

Tiu farmacia firmao multnacia intencas maldungi siajn dungitojn kiuj aniĝas al la Sindikato Petrol-Is. Ĉar ties socia sidejo estas en Bahamoj, ĝi opinias ke ĉio estas permesata al si : sed ties estraro malpravas.
Deva Holding, filio de la grupo EastPharma, devas repekti la nacian kaj internacian leĝaron kaj respekti Petrol-Is kiel kunparolanto de la socia dialogo. Kolektiva interkonsento estos la unua paŝo en la redungado de la 24 laboristoj maldungitaj.
La ĝenerala direktoro, Philipp Haas, ignoris ĝis nun, la intervenojn de IndustriALL sed anoncas nun la disvolviĝon de siaj operacioj internaciskale, dezirante akiri konformilojn de la altaj aŭtoritatoj de la publiksanaj administradoj en Eŭropo kaj Usono.
Partoprenu la retan kampanjon por esprimi al Philipp Haas ke vi kontestos la komercan ekspansion de Deva Holding tiel longe kiel ties dungitoj, interalie en Turkio, estos maldung-itaj pro sia aniĝo al sindikato.

**El la retejo: http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2534**

## Usono: Zara devas respekti la rajtojn de ties dungitoj




Inditex estas unu el la plej grandaj grupoj pri modo, ĉeestanta en 87 landoj kaj ekspluatanta 8 komercajn markojn, fiera pri sia tutmonda reputacio de socie respondeca firmao. Inditex subskribis, ekzemple, ĝeneralan akordon kun UNI kiu devontigas ĝin respekti la rajtojn de ties laboristoj ĉie en la mondo. En pluraj landoj, la dungitoj de Zara, kaj aliaj markoj de Inditex, ĝuas pri rajtoj konformaj al la devigoj menciitaj en tiu akordo.

Mirinde, ties praktikoj en Usono estas tute kontraŭaj. La dungitoj de Zara estas submetitaj al kondiĉoj de trudita partatempa laboro, malaltaj salajroj kaj por la etnaj malplimultoj, manko de promocia ebleco. Ili eĉ diras ke la direkcio de Zara en Novjorko limigas iliaj laborhorojn po 25 semajne por eviti devigojn koncerne san-asekuron.

En Usono, male al aliaj landoj, Inditex rifuzas praktike apliki la ĝeneralan akordon. En Usono, la laboristoj de Zara kaj Inditex ne ĝuas la samajn rajtojn de konsultado kaj intertraktado ol la laboristoj de aliaj landoj. En Usono, Inditex ne permesas – kiel ĝi faras en aliaj landoj – al la laboristoj havi la samajn rajtojn kaj libere elekti sindikaton, se ili deziras.

**El la retejo: http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2574**

# Kallelse till årsmöte 2015 för Svenska arbetaresperantoförbundet

**Datum: 28 mars**
**Tid: kl 12:00**
**Plats: Vuxenskolan, Göteborg.**

Vid frågor kontakta Inga Johansson via e-post: ishim@hotmail.com

Hör av er innan om ni tänker komma så vi vet hur många som kommer. Förbered gärna motioner och ta med. I samband med årsmötet kommer vi även ha en filmvisning och presentation av den nya boken La Korto. Vi återkommer i början av mars med ett mer detaljerat program, adress och vägbeskrivning.

**Mvh**
**Styrelsen**

Provizora propono je tagordo de la jarkunveno de SLEA tagmeze la 28a de marto 2015 eje deVuxenskolan, Göteborg.

1. Malfermo de la kunveno.
2. Decido pri la tagordo.
3. Konstato de la nombro da ĉeestantoj kaj saluton je la memoro de forpasintaj kamaradoj.
4. Decido pri la valideco de la kunveno.
5. Elekto de kunvena prezidanto.
6. Elekto de kunvena sekretario.
7. Elekto de protokolaj kontrolantoj.
8. Jarraporto.
9. Kasa raporto.
10. Revizia raporto.
11. Decido pri malŝarĝo de la estraro.
12. Decido pri jara agado.
13. Decido pri la jarkotizoj.
14. Decido pri budĝeto por 2014.
15. Elekto de prezidanto.
16. Elekto de kasisto.
17. Elekto de ceteraj estraranoj.
18. Elekto de reviziantoj kaj de anstataŭantoj.
19. Elekto de redaktanto/j de Arbetar-Esperantisten.
20. Elekto de responsulo/j de www.slea.se.
21. Elekto de responsulo de Libroservo.
22. Elekto de reprezantanto je la LEA-komitato de SAT.
23. Elekto de reprezantantoj je la sveda Esperantoinstituto.
24. Elekto de elekta komitato.
25. Decido pri la venonta jarkunveno.
26. Aliaĵoj.
27. Fermo de la jarkunveno.



# Facit till Esperantoskolans minilektion

**rätta svar till övningen på sidorna 4-5:**

-ebla - läslig, ätlig

-ejo – skola, stall

-aro – bergskedja, tältläger/camping

-ilo – våg, visselpipa

Aro, Ilo, Ejo, Ebla, Abelaro, Librejo, Fleksebla, Aŭdebla, Kudrilo, Kartaro, Ludilo, Presejo, Skribilo

## Aliĝu al Sennacieca Asocio Tutmonda

Jarkotizo de SAT 2015 (oni ricevas Sennaciulon + Sennaciecan Revuon):

535 SEK
285 SEK por junuloj (ĝis 25-jaraj), senlaboruloj, malriĉaj emeritoj kaj samfamilianoj de membro

La kotizo estas pagenda al la poŝtkonto (sveda ”plusgiro”): 26 63 22-7, Sennacieca Asocio Tutmonda, S.A.T.

Inga Johansson estas SAT-perantino en Svedio.
Retpoŝto de Inga Johansson: ishim@hotmail.com



# Paŝo

## Paŝo al la mondo

de KAGA Ranmaru

Japana studenta gazeto Paŝo aperis.

En aprilo de 2014, japanaj studentoj publikigis la gazeton Paŝo. La lingvoj estas Esperanto kaj la japana, kaj la enhavo estas diversa. Ĝi estas iniciatita de studentoj tra tuta Japanio, kie SAT-anaj studentoj agadas aktive. Laŭ la plano, ĝi estos daŭre eldonita en ĉiu monato. Oni aperigos diversajn artikolojn sentabue.

Ili celas per ĉi tiu gazeto fari solidarecon ne nur inter enlandaj studentoj sed ankaŭ inter eksterlandaj studentoj.

Ĉu vi estas studento? Se jes, bonvolu kontaktiĝi kun ili. Ili volonte akceptos la artikolojn skribitajn de eksterlandaj studentoj kaj deziras fervore amikiĝi kun aliaj studentoj. Aŭ informu pri la gazeto al viaj konataj studentoj.

Vi povas legi kaj elŝuti la gazeton per jena ligilo:

**http://pasxo.blogspot.se/2014/04/paso.html**












## Kurdio: la siriaj kurdoj proklamas egalecon inter viroj kaj virinoj



La lokaj aŭtoritatoj regantaj en la kurdaj regionoj de Sirio proklamis dekreton kiu garantias al virinoj la samajn rajtojn, kiel la viroj, raportis NRO kvalifikante la iniciaton « ofendo » kontraŭ ties ĝihadistaj malamikoj.

La virinoj kaj viroj estu « egalaj (…) en ĉiuj aspektoj de la civita kaj publika vivo », proklamas la teksto publikigita merkredon sur la fejbuka paĝo de la kurdaj aŭtoritatoj en la provinco Hasaka.

La Kurdoj ĉeestantaj nord-oriente de Sirio sukcesis starigi ian memstarecon okaze de konflikto komencita en marto 2011. Ili dekretis siajn proprajn regulojn kiuj aplikiĝas al ĉiuj loĝantoj – inkluzive arabaj – en la tri « kantonoj » konsistigantaj tiun memstaran regionon, ne agnoskita de la reĝimo de Damasko.

La dekreto listigas serion da rajtoj : malpermeso edziĝi antaŭ 18-jaraĝa, aŭ sen konsento, egaleco de laborkondiĉoj kaj laborenspezo, graveda ferio garantiata ĝis la tria infano, ktp. Ili ankaŭ kondamnas la « krimojn pro honoro », la « perfortojn kaj diskriminaciojn » kontraŭ la virinoj kaj malpermesas poligamion.

Fine, la dekreto garantias al la virinoj samajn rajtojn ol la viroj koncerne heredaĵon kaj por atesti ĉe tribunaloj. Laŭ la Siria Observejo pri homaj rajtoj (SOHR), la kurdaj siriaj virinoj ricevis ĝis tiam neniun heredaĵon.

Tiu dekreto estas « ofendo al la leĝoj dekretitaj de la grupo islama Ŝtato (IŜ), kiuj estas ege diskriminaciaj kontraŭ la virinoj », opiniis la direktoro de SOHR, Rami Abdel Rahmane.

De 2013, la bataloj furiozas inter Kurdoj kaj ĝihadistoj nord-oriente de Sirio. La kurda urbo Kobanê situanta ĉe la turka landlimo, fariĝis simbolo de tiu konflikto kaj pli ol 1.000 personoj mortis, plimulte ĝihadistoj, de post la komenco en septembro de la ofensivo de IŜ kontraŭ tiu loko.

« Dum ili batalas kontraŭ la ĝihadistoj, la Kurdoj ankaŭ deziras sendi mesaĝon al la internacia komunumo por montri ke ili alprenas demokratian kulturon favore al la civitaj rajtoj », certigis S° Abdel Rahmane, dum la kurdaj batalantoj de Kobanê estas subtenataj de la pafoj de la internacia koalicio.

La nova dekreto konsistigas « decidigan etapon por la regiono, kies triba socio longtempe estis regita de konservativaj sociaj moroj », li aldonis.

El http://neniammilitointerni.over-blog.com




Här är några länkar till några sajter på internet som sänder tv-program på esperanto. Musik, film, barnprogram, intervjuer, musikvideor med mera.

### Oficiala Retejo de Esperanto-TV

http://esperantotv.net

### Esperanto-tv.com

http://esperanto-tv.com

### SATeH

https://www.youtube.com/channel/UCygEiTDIwQTlE52xTkfOZ7A

### Globeto - Interreta Televido

https://www.youtube.com/playlist?list=PL6080927F401B564B

### Esperanto Televido

http://worldtv.com/esperanto-tv

## Aktivera dig i SLEA

Vi har för närvarande en klubb i Stockholm som träffas regelbundet. För tillfället läser dem och diskuterar boken Modernaj Robinsonoj av Teodoro Schwarz. Bor du i Stockholm och vill vara med så kontakta Soile Lingman – s.lingman@comhem.se.

Det finns även kontaktpersoner i Malmö, Göteborg, Gränna och Uppsala så om du bor där är du välkommen att höra av dig till arbetaresperantisten@hotmail.com så förmedlar vi kontakten!



# Libroservo de SLEA



### Libroj

| | |
|---|---|
| *7000 tagoj en Siberio* de Karlo Ŝtajner | 80:- |
| *Ĉu sekso subfosas?* de Paŭlo Popo | 75:- |
| *Doktor Zamenhof och det internationella språket* av L. Nordenstorm & C. Lörnemark. | 50:- |
| *Esperanto...över 50 miljoner träffar* av Lars Forsman | 150:- |
| *Kompendio de la kapitalo de Karlo Markso* de Carlo Cafiero | 100:- |
| *La danĝera lingvo – Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto* de Ulrich Lins | 120:- |
| *La homo kiu defiis Babelon* de René Centassi kaj Henri Masson | 120:- |
| *La Itala socialismo kaj Esperanto* de Gramski. | 50:- |
| *La liberecana socio* de Georg Bastien | 10:- |
| *La Pariza komunumo* de 1871. | 50:- |
| *La ŝtona urbo* de Anna Löwenstein | 200:- |
| *Historio de SAT 1921-1952* | 20:- |
| *Mortopuno - faktoj kaj dokumentoj* | 80:- |
| *SLEA kantaro* | 5:- |
| *Songôj de kristalo. Arko 2064* de Jerom Leroy. | 50:- |
| *Sveda laborista movado av* Tage Lindblom (1947) | 10:- |
| *Tertrema katastrofo de Japanio* de Jasuo Hori. | 140:- |
| *Vivbruligita (honorkrimo)* de Suad | 90:- |
| *Vualo de l' silento* de Ĝura | 80:- |

### Lernolibroj

| | |
|---|---|
| *EPoGo Esperanto por gimnazianoj* Textbok av C. Lörnemark, L. Forsman, K. Randehed & F. Wedlin | 150:- |
| *EPoGo Esperanto por gimnazianoj* Övningsbok av C. Lörnemark, L. Forsman, K. Randehed & F. Wedlin | 150:- |
| *Esperanto direkt* av Stano Marĉek | 90:- |

### Filmoj

| | |
|---|---|
| *Esperanto DVD* de Dominiko Gaŭtiero | 160:- |
| *The Universal Language / La universala lingvo DVD* - Sam Green | 140:- |

**Por pli da informo vizitu www.slea.se | För mer information besök www.slea.se**

**Sendu mendojn al la retpoŝtadreso aŭ al la adreso de SLEA sube:**
**Beställningar skickas till epostadressen eller postboxen nedan:**

**Retpoŝto:**
slea.smolando@hotmail.com

**Adreso de SLEA:**
Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio

**Afrankoj aldoniĝas je sendo de libroj/broŝuroj.**

**Plusgiro:** 53160-8
(Sv.Arbet.Esperanto.förb.)

ESPERANTO

## LÄR DIG ESPERANTO!

Esperanto är ett planspråk vars främsta syfte är att underlätta kommunikationen för människor med olika språkbakgrund. Detta "brospråk" är relativt lätt att lära sig på grund av sin regelbundenhet och flexibilitet. Då esperanto inte tillhör någon nation eller något folk är det även mer rättvist att använda än de nationella språken.

## ETT FUNGERANDE SPRÅK!

Ett språk dugligt för alla ändamål kan endast uppkomma ur en kollektiv process. Esperanto tillhör och formas av sina användare. Esperanto har använts i över 100 år och används idag i växande omfattning på internet. Dess användare finns idag i hela världen.

## FÖR DEMOKRATISK KOMMUNIKATION!

Alla som har erfarenhet av internationell kommunikation vet att språket kan vara ett hinder, men med hjälp av esperanto kan vi umgås som jämlikar.

## GÅ MED I SLEA!

Svenska arbetaresperantoförbundet SLEA (Sveda Laborista Esperanto-Asocio) arbetar för att sprida det internationella språket esperanto inom arbetarrörelsen och bland dess sympatisörer. SLEA tillhandahåller kontakter, bildnings- och propagandamaterial. SLEA betraktar esperanto som ett användbart verktyg i kampen för en klasslös värld.

**Hemsida:**
www.slea.se

**Epost:**
arbetaresperantisten@hotmail.com

**Plusgiro** 5 31 60 - 8.

**Adress:**
Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio

## MEDLEMSAVGIFT 2015

- Enskild medlem 100:-
- Familjemedlem 30:-

- Ungdomar upp till 20 år, arbetslösa, studerande och pensionärer 80:-

- Stödmedlemskap för organisationer 200:-